

# La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »  
julio-septembro 2011

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

## Diseco kaj kuneco

En pluraj landoj oni dissciigas informojn pri internaciaj, kundividitaj telefon Alvokoj. La personoj kiuj organizas la alvokojn trovas homojn kiuj naskiĝis en iu lando aŭ mondoregiono, sed kiuj aktuale loĝas en alia regiono pro militoj aŭ aliaj socie detruaj sitacioj. La grupalvokojn la organizantoj planas laŭ lingvo, por ke homoj povu interparoli per lingvoj ofte nekonataj aŭ neparolataj kie tiuj homoj loĝas. Virino el indiĝena gento de Laoso loĝas sen siaj familianoj kaj ankaŭ sen multaj samlingvanoj. Per la alvokoj ŝi jam trovis aliajn personojn kiuj, kiel ŝi, ne havas familian kontakton; nun ŝi scias ke ŝi ne estas la sola persono kiu tiel suferas. Ankaŭ ŝi havas per la alvokoj la plezuron kanti al la aliaj partoprenantoj antikvajn kantojn de sia gento, kvankam ŝi diras, “Mi estas maljuna; mia voĉo ne plu estas bona.” La poezia lingvo kiun ŝi kantas ne plu estas komprenebla al la junaj parolantoj de la ĉiutaga versio de la lingvo. (La nomo de la popolo en la angla estas “hmong”; mi ne povis trovi tradukon al Esperanto.)

“La vera homa cerbo”

“Ni neniam antaŭe vidis la veran, homan cerbon,” komentis Profesoro Van Wedeen de la usona Universitato Harvard.

Nova ekzamenado de la homa cerbo okazas ĉar nun eblas skani la “blankan materialon” de la cerbo. En tiu blanka materialo estas la nervofibroj kaj la informoportaj retaroj, ŝlosiloj—aŭ malŝlosiloj—al niaj memoroj, pensoj, kaj emocioj. Per tiu pionira laboro oni esperas fari novan esploradon pri skizofrenio kaj aŭtismo. Ankaŭ ŝajnas ke tio, kio pliklarigas homajn memorojn, pensojn, kaj emociojn povos multe informi ankaŭ pri lingvoj. Ĉu ni estas ĉe la sojlo de novaj kompreno kaj aliro al iuj lingvo-demandoj? Ni rajtas esperi!

Fonto: National Geographic magazino (Usono), julio 2011.

Mesaĝo de Unesko pri monda heredaĵo kaj disvolviĝ-bezonoj en afrikaj landoj

La afrika regiono aktuale ŝanĝiĝas multe pro disvolviĝo. Rezulte de tio, la Centro por Monda Heredaĵo de Unesko jene rekomendas:

---Studojn pri la eblaj efikoj de disvolviĝ-projektoj je la vivmedio, kaj simlajn studojn pri la forpreno de natur-rimedoj je la vivmedio ĉe heredaĵaj lokoj en afrikaj landoj.

---Specialan, internacian kunsidon, organizotan de la koncernaj afrikaj registaroj; tiuj landoj kune planu kiel simpligi urban planadon kaj teren-administradon por certigi pli bonan ekvilibron inter la konservado de kulturaj kaj naturaj heredaĵoj kaj la disvolviĝo.

Aparte grava estas la protektado kaj administrado de heredaĵ-lokoj en afrikaj landoj tuŝitaj je konfliktoj. Aktuale, 14 naturaj kaj kulturaj lokoj troveblas sur la listo "Monda Heredaĵo Endanĝerigita"; la plimulto estas en landoj kie okazis aŭ okazas konflikto. La tiurilata celo de politikaj organizoj estu la restaŭrado de paco kun adekvata protektado kaj daŭra konservado de la heredaĵejoj.

Fonto: World Heritage in Africa [Monda Heredaĵo en Afriko] (eldonas Unesko), 2011.

### Parolisto parolas

Citaĵoj de (s-ro) Harlan McKosato, indiana gastigisto/enscenigisto de programo kiu celas indianojn per radio kaj Interreto ([www.nativeamericacalling.com](http://www.nativeamericacalling.com)). La programformato uzas telefon Alvokojn ricevitajn de aŭskultantoj, kaj dissenditajn kun la komentoj de s-ro McKosato.

"Mi estas ponto-konstruanto, sed ne necese la solvo. La programo pritemas la solvodon de problemoj, kaj oni diversmaniere faras tion. Kelkfoje oni instigas kaj kelkfoje oni edukas. Laŭ mia percepto, ĉiam ekzistas pritraktendaj problemoj kaj jen la platformo por pritrakti ilin."

"Kelkfoje oni devas festi tion, kio bonas pri esti indiano. Ni devas energie enfokusiĝi kaj preni nian ĝustan socian pozicion! Ni bezonas ke niaj propraj gentanoj rakontu niajn historiojn. Niaj voĉoj estas aŭskultendaj."

Fonto: "Native America Calling," Native Peoples-magazino, julio-aŭgusto 2011, Usono.

### Pli pri praa agrikulturo kaj nunaj agrikulturaj bezonoj

En Américas-magazino (aŭgusto 2011) oni informas pri "camellones" en la Beni-a Valo de Bolivio. Do, la afero esta tute klara kaj bone komprenata, ĉu ne? Ho, ĉu vi deziras scii pli pri tiuj kamelecaĵoj? Bone, mi klarigos....

"Camellones" [ka-me-JO-nes] estis kaj estas altegitaj terenetoj inter kanaloj. La kombinaĵo de camellones kaj kanaloj estas ege utila por dreni terenon post la alveno de pluvo kaj glacirivera akvo, por ke ekzistu taŭgaj terenetoj por la konstruado de domoj kaj por agrikulturo.

La indiĝenaj bienistoj kiuj partoprenas projekton por rekonstrui la kanalojn kaj la "camellones" havas pli da rikoltoj dum la jaro kaj kaptas fiŝojn kiuj eniras la kanalojn. Krom havi tiujn avantaĵojn, bienistoj nun uzas la ligitajn kanalojn dum inundoj kiel ŝoseojn por porti siajn varojn al vendolokoj.

Komentoj:

Andrea Marcos, itala sociologo kaj analizisto pri manĝaĵ-sekureco, kiu vizitis la Beni-an Valon kiel reprezentanto de UNO: “La praavoj estis brilmensaj, kaj samaj estas la homoj kiuj hodiaŭ adoptas la sistemon. Jen ni havas memdaŭrigan sistemon kiu kaptas atmosferan karbonon, metas ĝin en la teron, kaj ankaŭ kaptas nutrenzojn el la akvo. Per la camellones, oni ŝanĝis tragedion en eblon por sukceso. Mi kredas ke ni povas vidi ĉi tion kvazaŭ la estontecon. Ĝi estas tre dinamika maniero por konservadi agrikulturan sistemon kiu povas estiĝi grava rimedo por la tuta homaro, ne nur por la enloĝantaro de ĉi tiu departemento aŭ de la amazona regiono.”

Herminia Guaji, kanal-prizorgantino: “Ni estas tre dankemaj al niaj praavoj kiuj elpensis ĉion ĉi. Iliaj posteuloj ankoraŭ manĝas pro la saĝeco de la praavoj.”

### La Deklaro pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj

Profesoro (s-ro) James ANAYA, Speciala Raportisto pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj raportis al la deka kunsido de la Daŭra Forumo pri Indiĝenaj Demandoj je la 19-a de majo 2011. En tiu raporto, Profesoro Anaya informis ke dum la pasinta jaro, la registaroj de Kanado kaj Usono decidis subteni la Deklaron pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Tiuj decidoj sekvis similajn dum la antaŭa jaro fare de Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Tiuj ŝanĝoj, kiel scias multaj el la legantoj de ĉi tiu bulteno, signifas ke la deklaro nun havas la bezonatan internacian subtenon por oficialiĝi.

La nuna situacio signifas ke ne-registaraj organizoj, inter li UEA, devas pripensi denove sian rilaton kun la deklaro. PIP certe devas vigle partopreni tiun pripensadon: kiel ni povos subteni kaj atentigi pri la Deklaro de la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj? Ĉi tiu bulteno kaj la “Yahoo”-grupo “Indiĝenaj Popoloj” estas inter multaj taŭgaj lokoj por esprimadi tiun subtenon; indas ankaŭ ke ni esprimu nian subtenon rekte al s-ro Stefan KELLER, kiu diligentas ĉe la Unuiĝintaj Nacioj por reprezenti la vidpunkton de UEA. Mi havas por li la retadreson stefano.retlistoj@gmail.com; ĉu estas aliaj pli taŭgaj? Esperantistoj neniam kaj neniel estu nur observantoj rilate gravan deklaron pri homaj rajtoj.

Mi petas ke vi esprimu viajn reagojn, opiniojn, kaj dezirojn rilate je la deklaro kaj kiel subteni, diskonigi, kaj efektiviĝi ĝin.

### La montetaranoj kaj translokiĝo

Dum longaj jaroj, etnaj popoloj daŭrigis siajn diversajn vivmanierojn en Ĉinujo kaj landoj de sudorienta Azio. Kiam okazis problema kontakto kun la registaro de iu el tiuj landoj, la solvo preskaŭ ĉiam uzita estis translokiĝo, ofte al pli foraj kaj izolaj montecaj lokoj. Tie la gentanoj tipe brulis kaj morthakis arbustojn kaj arbojn por prepari terenojn por agrikulturo. Unujara agrikultura produktado lasis la terenon sen nutrenzoj por subteni alian jaron de kultivado. Tia vivmaniero ne plu eblas, ĉar terenoj pli kaj pli okupiĝas kaj multaj terenoj sen-nutrenziĝas.

Grava rezulto de tiuj sitacioj estas ke montetaraj gentoj devas lerni kiel alfronti sen perforto la registarojn de la koncernaj landoj kaj certigi siajn rajtojn. Oxfam kaj aliaj ne-registaraj organizoj helpas la montetaranojn fari tion rilate registarojn kiuj kontraŭleĝe mistraktas aŭ preteratentas ilin, kaj ankaŭ helpas ilin negoci kun tiuj

registroj. La nuna entrepreno fare de montetaraj etnogrupoj baziĝas je lernado pri iliaj rajtoj, pri kiel negoci, kaj kiel paceme defendi la proprajn rajtojn kaj komunumajn terenojn.

S-ino Chanthy Dam, organizanto de montetaranoj kaj defendanto de komunumaj terenoj en Kamboĝo, komentis, “Ni ne estas senesperaj. Ni trovas manierojn por komuniki mesaĝojn rekte de problemtuŝitaj komunumoj al la registro kaj la internacia komunumo ĉar ni kredas ke internaciaj donantoj povas influi registarajn decidojn.” Gravas al s-ino Chanthy Dam ke “[registaraj] decidantoj... vere komprenu kiel siaj decidoj frapos kaj suferigos la indiĝenojn”.

Fonto: Oxfam Exchange, printempo 2011, “Cambodia: No Authority Can Take Ancestral Land” (Kamboĝo: Neniu Aŭtoritato Rajtas Forpreni Praavajn Terenojn)

## PIPofumo

Ĉi tiu sekcio de la bulteno pritraktas aferojn kiuj rilatas rekte al PIP kaj La Kalumeto.

### TALENTO SERĈATA:

La Kalumeto bezonas la talenton kaj diligentecon de muzikemuloj!

Evidentiĝas ke ekzistas multaj aspektoj de indiĝena muziko sciindaj kaj konindaj, sed aktuale ne pritrakitaj en ĉi tiu bulteno. Tiu situacio estas la rekta rezulto de talentomanko pri muziko flanke je la bulten-eldonanto.

Do, se plaĉas al vi verki kaj se vi pretas aŭskulti, esplori, kaj prikomenti indiĝenajn muzikojn, mi petas ke vi kontaktu min. (Vidu informajn bulteno-finajn.)

\* \*

Citaĵo sendita de (s-ro) Frank URIBAZO Pérez de Kubo:

“Tiel afablaj, pacemaj, bone ili estas,” skribis Kolombo al la Hispanaj Reĝoj, “ke mi ĵuras al Viaj Reĝaj Moŝtoj ke ne estas mondo kun pli bona nacio: Ili amas al siaj proksimuloj kiel al si mem, ilia parolado estas milda kaj ĝentila, kaj ĉiam akompanta de ridetoj; kvankam veras ke ili nude vagas, iliaj kondutmanieroj estas decaj kaj laŭdindaj”

## Kristoforo Kolombo, 1492

Aperis en La forgeso estas plena de memoro,” kiun verkis Washington Araújo de Brazilo

Komento sedita de (s-ro) Gary MICKLE de Usono, loĝanta en Germanujo:

Reago je la artikolo “Kiu...kaj kiu...kaj kiu me estas?” en La Kalumeto 11-2:

“Ĉies identecoj estas plurecaj kaj ŝanĝiĝemaj, kaj nur la koncernanto rajtas decidi kiel ili viciĝu laŭ relativa graveco. Ĉu Esperanto-parolantoj ĉiam respektas la identecajn elektojn de aliaj? Malnova etnisma literaturo plenas de malaprezaj eldiroj pri trans-etniĝantoj, kiuj forlasas “sian” identecon por preni “fremdan” (laŭ la interpeto de la komentantoj). Pli lastatempe, iĝis modo indigni pri uzantoj de anglismoj en ne-anglaj lingvoj—kvankam tio ofte okazas, ĉar homoj volas esprimi

tiumaniere specon de kosmopolita identeco. (Esperanto estas pli bona por tio ol la angla, sed oni devas unue scii ĝin!) La TEJO-rezolucio estas paŝo en la ĝusta direkto: al stato en kiu Esperanto-parolantoj estas tiom toleremaj kiom ili de longa tempo imagas sin.”

Kultivu bone—manĝu bone!

Priskribo de ero de la riz-ceremonio de la isan-gento de nordorienta Tajlando.

Grava ero de la riz-ceremonio kaj ankaŭ de la riz-kultivado estas la aplikado de sterko al la rizokampoj.\* La sterk-aplikado simbolas la fruktodonecon de homaj entrepenoj, agrikulturaj kaj aliaj.

Frumatene, viraj kaj inaj bienist-familianoj vizitas la rizokampojn por apliki simbolan kvanton da sterko. Nord-tajlanda vilaĝano tiel priskribis la ceremonion: “Oni devas apliki sterkon. Dum oni aplikas ĝin, oni devas informi al la spirita prizorganto de la kampo, ‘Hodiaŭ estas bonaŭgura tago. Mi portas la sterkon al la kampoj.’ Pasint-epoke, oni kundividis la sterkon kun parencoj kaj najbaroj. Nuntempe, oni devas aĉeti ĝin, se oni ne posedas bubalon aŭ oksojn.”

Ekde la jardeko 60-a, la uzado de minerala sterko aŭ grasumo sur la kampoj pli kaj pli okazas, sed ankaŭ la uzado de vera sterko okazas.

Fonto: The Art of Rice: Spirit and Sustenance in Asia (La Riz-arto: Spirito kaj Vivotenado en Azio), Usono.

## Forkuraj Rakontoj

“La kampadejo de la stultularo”

(de la “Apache” [a-PA-ĉi]-gento de Usono venas ĉi tiu rakonto. Ekzistas multaj “stultularaj” rakontoj; ilia celo estas instrui kiel vivi—per malbonaj ekzemploj!)

Ekzistis kampadejo de stultuloj. Ĝi estis facile troveba de ĉiuj homoj, inter ili la malamikoj. Soldatoj rapide trovis ĝin kaj kelkaj stultuloj foriris por saluti ilin; la soldatoj ekpafis al ili.

“Vi estas bonvenaj,” diris stultulo. La soldatoj pafmortis lin.

“Kial ĉi tiuj soldatoj pafas al ni?” demandis unu stultulo al alia. La soldatoj pafmortis ilin.

Kelkaj stultuloj aliris la soldatojn. “Kial vi pafas al ni?” ili demandis. La soldatoj pafmortis ankaŭ ilin.

La soldatoj ade pafis. Post konsiderado, maljunulo inter la stultuloj ekkomprenis la situacion. “Mi kredas ke ni devas forkuri,” li diris.

“Tio estas bona ideo,” diris la stultuloj kiuj ankoraŭ vivis. Kal ili tiel faris.

Fonto: Our Stories Remember, de (s-ro) Joseph Bruchac, Usono

“Kiel la hieno eskapis la varanon”

(Rakonto el la “baynunk”-lingvo de Senegalo, Gambiolando, kaj Bisaŭgvineo. La

lingvo estas endanĝerigita laŭ UNO.)

Itaalintaa! La rakonto komenciĝu!

Iam hieno konstruis abelujojn. Lia edzino diris al li ke ŝi iros al la arbaro por trovi spicofoliojn por la vespermanĝa rizo.

Dum la hienino promenis en la arbaro, ŝi aŭdis kriojn. Portanta la korbon, ŝi rapidis al la loko de kie ŝi aŭdis la kriojn. La hienino trovis bestogrupon en maldensejo. Tie, la bestoj duope luktis. La gajninto pluvivis, la perdinto mortis. La hienino decidis ankaŭ lukti. Ŝi elektis lukti kontraŭ antilopo. Rapide la hieno stumbligis la antilopon, kaj tuj poste mortigis ĝin. La hienino metis la kadavron de la antilopo en sian korbon por porti ĝin hejmen. Poste, ŝi denove luktis kaj gajnis, kaj baldaŭ ŝi havis du bestokadavrojn en la korbo; ŝi reiris hejmen.

Kiam la hienino atingis sian hejmon, ŝi alvokis sian edzon kaj petis helpon pri la korbo. La edzo diris al ŝi, "Ĉu vi ne kapablas porti korbon en kiu estas kelkaj folioj?" La hienino diris ke ŝi plukis multajn foliojn kaj pro tio bezonas lian helpon. Kiam la virhieno portis la korbon, li ekkomprenis ke en ĝi estis pli ol folioj: "Jen kadavroj—jen viando!"

La hienino diris al sia edzo pri la lukto-grupo en la arbaro. Li tre entuziasmiĝis, kaj eklaboris por fari la amuletojn de bonŝanco kiun li portos surbrake kiam li iros por lukti kaj gajni. Kiam li finis sian laboron, li marŝis al la luktejo. Dum li marŝis, la amuletoj frapsonis: ĝe-ĝe-ĝe-ĝe....

Kiam la bestoj aŭdis la frapetsonoj kiujn faris la amuloj, ĉiuj demandis, kio estas tio. Kiam la hieno alvenis, li diris, "Mi venis por lukti kaj gajni!" La hieno luktis kontraŭ cervino kaj gajnis. Li metis ŝian kadavron je unu flanko kaj tiam luktis kontraŭ antilopo. Denove la hieno gajnis. Pro tio ke lia edzino mortigis du bestojn, li volis mortigi tri.

La hieno luktis kontraŭ varano. La hieno mokis lin. Li diris ke la vosto de la varano estas tro granda. Li diris ke la piedoj de la varano estas tro malgrandaj por povi marŝi. La du bestoj ekluktis, kaj la varano stumbligis la hienon. Tio kompreneble signifis ke venis la mortomomento por la hieno, sed li komencis paroli kun la varano kaj baldaŭ la varano permesis ke la hieno vivu kaj denove luku. Rapide la varano denove stubligis la hienon. Ĉi-foje, la hieno ne penis paroli. Li uzis sian spiradon pro kuri, pa-pa-pa-pa....

Rapide la hieno kuris en la arbaron. Li atingis maldensejon kie virino preparis ĉion por kuiri per granda poto. La hieno saltis en la potegon—pluŝ—kaj la virino forkuris.

Samrapide la varano sekvis la hienon. Kiam la varano atingis la maldensejon kaj vidis la poton, li zorge rigardis la terosurfacon kaj trovis ke la piedsignoj de la hieno haltis apud la poto. La varano uzis kunigitan brul-lignon por komenci boligi la hienon! Subite la hieno kriis kaj saltis el la potego. Rapidege li eskapis tra la arbaro, kaj la varano ridege lasis ke la malsekaĉa besto savu sian vivon.

Fonto: Retpaĝaro de la organizo Sorosoro (Por ke la lingvoj de la mondo pluvivu!)

## Walker

(Honore al (s-ino) Kath Walker, poeto kiu estis aŭstrala indiĝeno.)

Daŭre luktu, Fratino, daŭre luktu.

Ekmovu ilin per via kolero.

Iru antaŭen, Fratino, rekte paŝu,

Ni bezonas ke vi alproksimiĝu la fajrejon.

Via menso neniel dezerto estas,

Sed similas lancon segil-dentan.

Vi devas estri la paroladon, paroli por nia raso,

Helpi nin vivi sen timo.

Vi ne naskiĝis por preteratenti iun,

Aŭ ripozi en verda laŭbo,

Sed por lukti ĝis akordo-vorto,

Ĝis la venk-atingo.

(El Jagardoo de aŭstrala, indiĝena poeto Jack Davis.)

## Projekto Indiĝenaj Popoloj

Erik Felker / 414 E. Cedar Ave., Apt. 11 / Burbank, CA 91501 / U.S.A.